

# Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

## Pro la malsano COVID-19

Por preventi malsanon kaŭzitan de novtipa korona viruso (COVID-19), kelkaj el niaj planoj ŝanĝiĝis, nuliĝis aŭ prokrastiĝis.

◆ Prokrastiĝis la 118-a legokunsido planita por la 7-a de marto. Anstataŭe ĝi okazos en la 6-a de junio.

◆ Nuliĝis Hama-Ronda Vespero planita por la 21-a de marto, kun gasto s-ro J-MENT.

◆ Ŝanĝiĝis, kaj ŝanĝiĝos klasoj, kies detalon ni ne notas ĉi tie.

◆ Tiu ĉi organo, marta n-ro de “La Novaĵoj Tamtamas” aperos nur elektronike en la pdf-formato en 2 paĝoj. Paperan version ni planas eldoni kaj ekspedi, kune kun la aprila n-ro. Tio estas ĉar la loko de la presado kaj ekspedado de la organo, nome la publika spaco en la kutima kunvenejo, estas fermita.

([KK]=nia kutima kunvenejo, nome Kanagawa-Kenmin-Sentaa, proksime de la Stacidomo Jokohama)

## Okazis

### \*feb. 15 [KK] Hama-Ronda Vespero

Estis prelegoj pri Kanado, la lando de la UK. Sibayama Zyun'iti prezentis ĝenerale pri UK, la regiono Montrealo kaj pri acero, la simbolo de Kanado. Namba Fumiharu prezentis pri la trafiko kaj loĝiga cirkonstanco. Partoprenis 10, el kiuj 7 intencas viziti la UK-on.

### \*feb. 16 [ĉambro en la Domo de JICA] Prelego

Kadre de Jokohama Internacia Forumo, nia rondo havis prelegon – S-ino Doi Ĉieko parolis pri Verda Majo, japanino batalinta en Ĉinio kontraŭ japana militarismo, kaj verkadis en Esperanto. Poste s-ro Namba Fumiharu havis okazon prezenti Esperanton mem. Li, en la komenco montris kuraĝigan mesaĝon de tutmondaj esperantistoj al esperantistoj en Vuhano, luktinta kontraŭ la novtipa viruso.

## Niaj klasoj kaj kursoj

Okazas jenaj klasoj (kutime en [KK])

### \*Regulaj Klasoj en sabato

(1) Klaso “Eseoj”, por legi “Tamen ĝi moviĝas!” gvidate de Doi Hirokaz

(2) Jokohama Salono. 2 fojojn monate oni legas “La Ŝtona Urbo”, originalan romanon de Anna Löwenstein, 1 fojon – libera verkado; kaj alian fojon –tradukado laŭ sia plaĉa fonto.

### \*Regulaj Klasoj en merkredo

(1) Klaso “Belĉielo”, por legi “Silento”, tradukon de la japanlingva originalo, gvidate de Doi Ĉieko

(2) Klaso “eriko”, por legi “Kumeŭaŭa”, gvidate de Doi Ĉieko

### \*Neregula Klaso

(1) Klaso “Teksantoj”, por legi “Kie boacoj vagadas”, per la gvido de Doi Ĉieko, du fojojn monate.

\*Rapida Kurso, por legi la lernolibron “Esperanto laŭ metodo Friis”, per la gvido de Doi Ĉieko, unu fojon semajne, en la Universitato de la Urbo Jokohamo.

---

---

## Eseo kaj raporto

---

---

### La Nova Korona Viruso (2019-nCoV)

2020-02-15 Mizro Iwaya

Lastatempe kiam mi preterpasis la kajon de Daikoku, Jokohamo, mi vidis grandan krozŝipon haltanta tie. Ĝi estis *Diamond Princess* kiu enhavas kelkajn pacientojn de la nova pneŭmonio inter gastoj kaj ŝipanoj, kies tuta nombro estas pli ol 3000. Ĝi havas fortan infektemon kaj oni ne povas enlasi tiajn suspektatojn en sian landon, ĉar la pacientoj multiĝas pli kaj pli en la mondo kaj efika kontraŭrimedo ne estas trovita nun.

La origino de la malsano estas urbo Vuhano, Ĉinio. Oni diras ke ĝiaj unuaj pacientoj aperis inter kelkaj laborantoj de viandovendejo de sovaĝaj bestoj en la bazaro, sed oni ne povas certigi tion nun. Oni tute ne agnoskis ĝin grava en tiu tempo. Sed baldaŭ elturniĝis ke ĝi estis grava ĝermo de severa epidemio. La nombro de infektitoj grandiĝis rapide, kaj ankaŭ mortintoj multiĝis tagon post tago. Ilia nombro estas 1113 en Ĉinio kiel status en 12a de februaro.

La simptomo de la malsano estas unue alta febro, pli ol 38 gradoj celsie, malvigleco kaj tusado. Se ĝi serioziĝas, la paciento ekhavas malfacilon en spirado

kaj fine mortos pro sufokado. La fenomeno estas tre simila al ĝisnuna pneŭmonio, sed la kaŭzanta viruso estas tute nova kaj ne traktebla per ĝisnuna maniero. La scienca nomo de la viruso estas 2019-nCoV (*2019 novel coronavirus*, montrita dekstre) kaj la oficiala nomo de la malsano estas COVID-19. Pli ol 90% de ĝiaj pacientoj aperis en la urbo Vuhano, provinco Hubejo. La ĉina registaro jam fermis la urbon kaj provincon haltigante transiron al kaj el tiu loko. Ankaŭ en Japanio la registaro malpermesis eniron de vizitintoj al tiu provinco kaj plu konsideras pli striktan limigon. Supre montrita kruzŝipo *Diamond Princess* ne vizitis la provincon, sed aperis tie unua paciento, kaj la posta inspekto montris multe da infektitoj.

Nun japanaj ĵurnaloj kaj televidoj ĉiutage raportas ĝisdatigitan staton de la malsano. Supraj nombroj certe malsamas kiam vi legas tiun ĉi artikolon. Ni povas fari nenion kontraŭ tio krom atente observi la novaĵon.

### La viruso poste

2020-03-13 Sibayama Zyun'iti


Preskaŭ monaton post la supra eseo de Mizro Iwaya, nun en Japanio status jene, sed tagon post tago sin ŝanĝanta.

\*El la 3711 maristoj kaj pasaĝeroj en la kruzŝipo *Diamond Princess*, 697 personoj estis pozitivaj je la viruso, kaj 7 mortis.

\*En Japanio (krom ĉi-supra) estas 714 personoj pozitivaj je la viruso, 640 pacientoj, kaj 21 mortintoj.

Por preventi la pozitivigon kaj malsanigon, multaj provoj estis faritaj. Preskaŭ ĉiuj lernejoj estis fermitaj en marto. Multaj grandaj eventoj estis nuligitaj, kaj eventejoj fermitaj. Influo de tio aperis ankaŭ ĉe ni, kiel montrite en la fronta paĝo.

Cetere, neniu infektito estas trovita en nia grupo.



la virusoj per mikroskopo  
(foto el NIAIO-RML, laŭ Vikimedio)